Ба 85 901

# GROMADA

DIM. SNEJKO

MINSK 1928

Ба 85901 бр

# OKCIDENTA BLANKRUSIO KAJ BLANKRUSA KAMPARAN-LABORISTA UNIO "GROMADA"

ELBLANKRUSIGIS
DIM. SNEĴKO

ELDONO EN ESPERANTO
DE KOMITATO DE SCIENCAJ LABORANTOJ KAJ VERKISTOJ DE BSSR POR DEFENDI BLANKRUSAN KAMPARAN-LABORISTAN UNION "GROMADA"

Б а 85901
Бел. аддзел 1994 г

MINSK 1928

92

25.04.2009

## ENHAVO


| | pağo |
|---|---|
| Alvoko de la Komitato | 5 |
| Enkonduko | 8 |
| Okcidenta Blankrusio, ĝia teritorio kaj loĝantaro | 10 |
| Milito de 1914—1918 kaj elloĝiĝo | 11 |
| Koloniigado de Okcidenta Blankrusio per poloj | 12 |
| Lernej-kleriga movado en Okcidenta Blankrusio | 13 |
| Rezultoj de pola mastrumado en Okcidenta Blankrusio | 14 |
| Blankrusa Kamparan-Laborista Unio "Gromada" | 18 |
| Klarigoj | 31 |

## AL SCIENCAJ KAJ KULTURAJ AGANTOJ KAJ AL LABORULARO DE LA TUTA MONDO!

Kvarmiliona loĝantaro de Blankrusio, troviĝanta en la limoj de Polio, travivas la plej tragikan momenton en la historio de sia ekzistado.

Sep jaroj de pola regado en Okcidenta Blankrusio alkondukis la lastan ĝis plena ekonomia kaj kultura regreso. La politiko de poligado kaj aspiro de Polio transformigi Okcidentan Blankrusion en agraran kolonion, pli malbonigis la situacion de blankrusia kamparanaro kompare eĉ kun ĝismilita tempo. Precipe malfacile respeguliĝas je kamparanaro tiel nomita "osadnictvo" — aŭ disdono de blankrusa tergrundo al polaj demobilizitaj soldatoj. La vilaĝetojn de "osadnik-oj" oni enklinigas en la blankrusan terspacon por la celo de artefarita poligado kaj al proprigo de la lando por Polio.

Formale havantaj egalajn rajtojn, blankrusaj kamparanoj kaj laboristoj fakte estas senigitaj de ĉiuj rajtoj; blankrusanojn oni ne dungas por labori, ne nur en la regnaj institucioj, en la fabrikoj, por fervojo, sed eĉ en bienoj.

Kvarmiliona loĝantaro estas senigita de rajto havi la lernejon en gepatra lingvo. Blankrusaj lernejoj kaj instruistaj seminarioj estas fermitaj laŭ ordono de pola registaro en la jaro 1922.

Blankrusajn infanojn oni devige enirigas en la polajn lernejojn. La gepatrojn, pro nesendado de siaj infanoj en tiujn ĉi lernejojn, oni monpunas kaj tion ĉi oni faras malgraŭ tio, ke laŭ ĝismilita pola statistiko oni nombris en Okcidenta Blankrusio ne pli ol 6% da poloj.

Termalriĉeco, "osadnictvo", netolereblaj, malfacilaj impostoj, multnombraj monpunoj, malpermeso de la gepatra lernejo — ĉio kiel malfacila ŝarĝo premas la blankrusian popolon, kondukas ĝin al plena kultura regreso, al malriĉeco kaj malsato.

Ĉian proteston kontraŭ neaŭdita ekonomia kaj nacia subpremado, la pola registaro konsideras kiel regnan perfidon, grandegan regnokrimon.

Ĉiam, seninterrompe oni organizas amasajn arestojn — oni arestas pro ia elmontro de aktiveco, kiel en kultura, tiel en sfero de kooperativa agado. Polaj malliberejoj estas plenplenaj de

blankrusoj. Turmentoj, mokegoj en la malliberejoj estas enkondukitaj kiel sistemo.

Kruelaj turmentoj de arestitoj en polaj turmentejoj rememorigas la tempon de mezepoka inkvizicio. Pri tio plej bone certigas la oficialaj dokumentoj de pola sejmo — interpelacioj de blankrusaj deputitoj de ĉi tiu sejmo.

Neaŭditaj premoj kaj persekutoj de tempo al tempo kaŭzis inter parto de loĝantaro eksplodojn de armita batalo, partizanajn ribelojn, kiuj kun eksterordinara krueleco estis subpremataj de la pola registaro.

La plej granda parto de la blankrusa loĝantaro de Okcidenta Blankrusio ekstaris por defendi siajn naci-rajtojn, por konservi sian homan honoron per organizita amasdefendo kaj memagado. La formo de tiu ĉi amas-defendo, kiu unuigis ĝis cent miloj da blankrusaj kamparanoj kaj laboristoj — estis "Blankrusa Kamparan-Laborista Unio Gromada"; ĝia statuto estas laŭleĝa. Ĉi tiu organizo naskiĝis, kiel natura ago por memdefendo kaj memkonservo de nacio kontraŭ plena fizika neniigo. La tuta agado de "Gromada" estis direktita al organizado de vastaj popolaj amasoj por batalo kontraŭ la kapricoj de regantoj, kontraŭ nacia subpremo, por batalo pro la interesoj de kultura kaj ekonomia ekzistado de laborulaj amasoj de Okc. Blankrusio.

Organizado de Blankrusa lernejo kaj kulturaj institucioj, kooperigo de la loĝantaro ktp. — jen estas la kulpo de Gromada kontraŭ la pola registaro, kulpo, pro kiu estis nuligata centmilana organizo kaj arestitaj centoj da ĝiaj membroj.

La arestoj de blankrusaj deputitoj en pola sejmo — Taraŝkeviĉ, Rak Miĥajlovskij, Metla kaj Voloŝin estis farataj per la rompo de leĝo pri deputita netuŝebleco.

Kune kun nuligo de Gromada estis komencata la nuligo de blankrusaj kooperativaj bankoj, iliaj gvidantoj estis arestataj. Estis arestataj Anton Luckeviĉ kaj Rodoslav Ostrovskij, la gvidantoj de "Asocio de Blankrusa lernejo". Ĉiuj arestoj estis farataj pro denuncoj de spionoj kaj provokistoj nur pro tio, ke ili estis kvazaŭ membroj de Gromada, efektive ili estis "agentoj de fremda regno".

Fakte la afero estas tiel, ke ĉiuj arestoj, same kiel la juĝo je la Blankrusa Gromada evidentigas la dezirojn de la pola registaro premsufoki la kulturajn blankrusajn centrojn, premsufoki la memagadon de la amasoj.

Ni reprezentantoj de scienco kaj kulturo de BSSR, sange interligitaj kun la laborulaj amasoj de Okc. Blankrusio, konstruante blankrusan kulturon en libera Sovetlando, flame protestas kontraŭ tia politiko de pola registaro, celanta al fizika neniigo de blankrusa popolo.

Ni protestas kontraŭ la juĝo je la nomo de la tuta nacio!

Ni alvokas la laborulajn amasojn de frataj uniaj respublikoj fortigi la protest-movadon kontraŭ tia akto de klasa ekzekuto, farita de la reganta klaso de Polio kontraŭ la vilaĝanoj kaj laboristoj de Okc. Blankrusio.

Ni alvokas la homojn de scienco kaj kulturo, ni alvokas la laborulajn amasojn de la tuta mondo — aliĝi al nia indigna voĉo!

Ni alvokas la tutan kulturan mondon eklevi sian potencan voĉon de protesto kontraŭ la juĝo de la subpremata popolo!

Organizu la komitatojn por defendo!

Sendu la esprimojn de via protesto al la pola registaro!

Ne permesu la maljustecon kontraŭ la tuta nacio!

Detenu la levitan super la laborulaj amasoj de Okc. Blankrusio manon de pola faŝismo!

**Komitato de sciencaj laborantoj kaj verkistoj de BSSR por defendi Blankrusan Kamparan-Laboristan Union "Gromada".**

**Prezidanto de komitato:**

Popola poeto de Blankrusio, efektiva membro de Instituto de Blankrusia Kulturo, J a n k a K u p a l a.

**Membroj de la komitato:**

Popola poeto de Blankrusio, efektiva membro de Instituto de Blankrusia Kulturo J a k u b K o l a s; prezidanto de Sekcio de Scienclaborantoj de BSSR, profesoro S. V o l f s o n; prezidanto Inbelkult, prof. V. I g n a t o v s k i j; meritoplena profesoro, Rektoro de Bl. Regna Universitato, efektiva membro de Inbelkult, V. P i ĉ e t a; efektiva membro de Inbelkult, Z. J i l u n o v i ĉ; efektiva membro de Inbelkult kaj scienca Sekretario de Inbelkult, V. L a s t o v s k i j; docento de B.R.U., D-ro A. S e n k e v i ĉ; efektiva membro de Inbelkult kaj prezidanto de Ĉefsciencoficejo de BSSR, S. N e k r a ŝ e v i ĉ; Direktoro de Scienc-Esplora Instituto de Vilaĝa kaj Arbara Mastrumado, G. H a r e c k i j; efektiva membro de Inbelkult, p r o f. A. S m o l i ĉ; p r o f. M. G r e d i n g e r, A. C v i k e v i ĉ, A. O s e r o v i ĉ, docento de B.R.U.; efektiva membro de Inbelkult, J. L j o s i k, J. K l y s, T r a m p o v i ĉ.

# ENKONDUKO

Por pli bone kompreni la nuntempan staton de Okcidenta Blankrusio, necesas fari malgrandan ekskurson en ĝian pasintecon.

En la historio de Blankrusio oni nombras kvar periodojn de almilitoj.

La unua almilito, kiun memoras la historio, okazis en Blankrusio en la 9. ĝis 10. jarcentoj per Varjago-Rusaj armitaj bandoj, kiuj lasis al nia lando siajn gvidantajn ĉefojn-princojn kaj bojarojn. Sed tiu ĉi unua almilitinto trairis en la historio de Blankrusio, ne lasinte iun sufiĉe gravan postsignon nek en la lingvo, nek en la kulturo blankrusia. Tiuj malamikoj baldaŭ miksiĝis kun la ĉiama blankrusa loĝantaro de la lando.

Alia almilito de Blankrusio okazis fine de la 12. kaj komence de la 13. jarcento per litov-princa dinastio, sed ankaŭ tiu ĉi almilito ne lasis iujn postsignojn; ĝi estis plej facile forigata de blankrusa elemento. Nura signo de ĉi tiu almilito restis en nia historio en tio, ke dum preskaŭ 500 jaroj (de 13. ĝis fine de 18. jarcento), organizita de litova dinastio sur la blankrusia grundo, la regno nomiĝis — Litovio. Sed en tiu Litovio la regna lingvo kaj kulturo estis blankrusaj.

Sufiĉe gravan postsignon lasis en Blankrusio — tria almilito — pola, kiu okazis ĝis fino de la 16. jarcento. Tiu ĉi almilito ne estis armita militiro de poloj al nia lando. Ĝi okazis pro komunaj interesoj de posedanta kaj gvidanta klasoj de Blankrusio kun tiaj de pola nobelaro. La libervola kunligo de blankrusia bojararo kun la pola nobelaro bazis unuvice sur la ebleco de komerca disetendiĝo de blankrusia bojararo laŭ la markitaj de pola komerca kapitalo vojetoj al la okcident-eŭropa merkato.

Blankrusiaj bienuloj uzis la aparaton de pola komerca kapitalo, kaj ili estis ekonomie dependaj de tiu ĉi aparato. Sur ĉi tiu grundo okazis poligado de blankrusia ĉefaro kaj samtempe ĝia alkutimiĝo al okcident-eŭropa latina kulturo.

Unu el la rimedoj de poligado estis religi-katolika propagando. Por la celoj de alkutimiĝado ne nur de la posedantaj klasoj, sed ankaŭ de la popolaj amasoj, per la pola feŭda nobelara imperialismo estis naskita kaj efektivigata la ideo de religia unio (Уния) tiel nomita "uniactvo" (unjactvo).

Tio ĉi helpis al poligado de blankrusa aristokratio, nobeloj kaj burĝoj, sed malmulte respeguliĝis en la popolaj amasoj.

Kvara almilito de Blankrusio okazis fine de 18. jarcento. Post la divido de federacia pola-litova regno, — Reĉi Pospolitoj (Rzeczy Pospolitej), litovaj-blankrusaj terspacoj estis aligataj al la Rusia Imperio. Rusio, forpreninte blankrusiajn terspacojn mem ne sukcesis regi ĉi tie kaj dividis la regadon super la blankrusaj laborulaj amasoj kun la polaj bienuloj.

La cara registaro lasis en la manoj de polaj bienulaj klasoj la ekonomian ekspluatadon de la lando en la samaj limoj, kiel dum la ekzistado de sendependa Polio, kaj lasis por si politikan gvidadon kaj influon, limigante tiele la laboron de tiuj klasoj libere estri la forrabitan. Ekonomia subpremo de polaj bienuloj kaj politika subpremo al la cara oficistaro — jen kion ricevis blankrusaj laborulaj amasoj post tiu kvara almilito.

La politiko de poligado de la lando dum la unua periodo ŝanĝiĝis per la politiko de deviga rusigado per la plena malpermeso de blankrusaj lernejoj, literaturo ktp.

Okcidenta Blankrusio travivis ankaŭ kvinan almiliton en sia historio — armitan polan okupon. Tiu kvina periodo en la vivo de Okcidenta Blankrusio — estas la temo de nia pritrakto.

## OKCIDENTA BLANKRUSIO, ĜIA TERITORIO KAJ LOĜANTARO

Okcidenta Blankrusio — tiel nomiĝas nun tiu parto de etnografia blankrusa teritorio, kiu apartenas al pola regno, kiel subpremita provinco.

Konforme al la packontrakto (interkonsento), kiu estis subskribata inter Polio kaj Sovetio la 18. marto 1921, al Polio estis aligataj jenaj teritorioj: tuta Grodna gubernio; uezdoj: Brestski, Belostokski, Kobrinski, Pruĵanski, Valkavysski, Slonimski; tuta Wilna gubernio; uezdoj Disenski, Vilejski; partoj de Minska kaj Slucka uezdoj.

Ĉi aligita al Polio blankrusia teritorio havas terspacon de pli ol 100 000 kv. kilometroj kaj preskaŭ tri kun duono da milionoj da loĝantaro, kiu ĝis la milito (1908) loĝis:

| Nomoj de uezdoj | blankrusoj | poloj | hebreoj | litovoj | aliaj |
|---|---|---|---|---|---|
| Disenski . . . . . . | 88 | 2 | 9 | 0,3 | 5,9 |
| Vilejski . . . . . . | 87 | 3 | 9 | 0,0 | 0,9 |
| Lidski . . . . . . . | 80 | 6 | 11 | 8,7 | 1,2 |
| Novoharadski . . . . | 89 | 3 | 9 | 0,0 | 1,7 |
| Slucki . . . . . . . | 83 | 4 | 12 | 0,0 | 1,8 |
| Slonimski . . . . . . | 85 | 0,3 | 14 | 0,1 | 2,1 |
| Vaŭkavysski . . . . . | 86 | 1 | 12 | 0,0 | 2,3 |
| Grodnenski . . . . . | 77 | 4 | 20 | 1,4 | 6,3 |
| Pruĵanski . . . . . . | 86 | 0 | 13 | 0,0 | 3,2 |
| Brestski . . . . . . | 75 | 2 | 22 | 0,0 | 5,9 |
| Kobrinski . . . . . . | 85 | 1 | 14 | 0,0 | 5,9 |
| Pinski . . . . . . . | 79 | 3 | 18 | 0,0 | 2,6 |
| Sakolski . . . . . . | 87 | 1 | 11 | 0,0 | 1,8 |
| Belostokski . . . . . | 47 | 18 | 24 | 0,0 | 6,7 |

Tiamaniere ĝis la milito sur la teritorio de Okcidenta Blankrusio poloj konsistas el negranda malplimulto de 0 ĝis 2% kaj ne pli ol 5% de la tuta loĝantaro de la lando blankrusoj havis samtempe 80 ĝis 82%.

Laŭ la klasa divido la loĝantaro de Okcidenta Blankrusio konsistis el jenaj grupoj:

| | bienuloj | burĝoj | vilaĝanoj-laboristoj |
|---|---|---|---|
| Blankrusoj . . . . . . | 0 | 0 | 80—82 % |
| Poloj . . . . . . . . . | 3 % | 1,2 % | 0— 5 % |

80—82% da blankrusoj havis preskaŭ 1 500 000 hektarojn da terspaco, 3% da poloj havis pli ol 3 000 000 hektarojn (oni konsideras la tutan kvanton de la tero, ĉu plugeblan, ĉu troviĝantan sub la arbaro).

Tiu ĉi neegala distribuo de nacia riĉaĵo montris specialan situacion de poloj kaj blankrusoj, precipe de ĉi-lastaj, kiuj en sia propra lando estas subpremitaj, kaj kies memregadon forprenis fremduloj.

## MILITO DE 1914—1918 KAJ ELLOĜIĜO

La mondmilito, kiu komenciĝis en 1914, alportis tiun detruon, kiun ne konis ia ajn alia lando en la mondo. Pro tio, ke en la limoj de la lando troviĝis tri tre gravaj fortikaĵoj (Brest, Grodno kaj Ossovec), — dum la germana ofensivo 1915, caraj generaloj ordonis elloĝigi la tutan loĝantaron el la ĉirkaŭaĵoj de tiuj ĉi fortikaĵoj en la internon de la imperio. Kiam fariĝis tre klare, ke la fortikaĵoj ne plu povas sin defendi, tiam al reirantaj armeoj estis ordonite detrui la landon post si, por lasi al la germanoj nur malplenan kampon. Rezulto estis, ke oni devige elloĝigis la vilaĝanojn de preskaŭ tuta Grodna gubernio kaj sendis ilin en Centran Rusion. Miloj da vilaĝoj estis forbruligataj kun inventaro kaj provizoj. Preskaŭ 2 milionoj da loĝantoj estis deŝirataj de sia lando kaj ĵetataj kun la infanoj en malproksimajn, por ili nekonatajn landojn. Per centoj da veturiloj veturis tiuj forkurantoj tra Rusio al Siberio kaj Mez-Azio perdante survoje sian havaĵon kaj mortante pro epidemioj kaj malsato.

Travagante de 3 ĝis 7 jaroj en fremda lando, la resto de forkurantoj, kiu travivis feliĉe la malsaton kaj malsanojn — post la foriro de la germanoj revenis patrolanden, sed okupado de la lando per polaj armeoj haltigis la forkurantojn sur la limo, kaj nur en 1920—1922 j. la forkurantoj sukcesis reveni hejmen.

Forkurado kaj milito tute detruis la landon. En Bresta uezdo estis mortigitaj 69% de la loĝantaro, en Pruĵana 55%, en Slonima 55%, en Kobrinska 50% en la ĉirkaŭaĵoj de Grodno, Volkovyssk, Ossovec 47%, en Aŭgustova uezdo 37%. Aliaj uezdoj perdis 25—35% de sia loĝantaro.

Oni nombris ĝis 525 000 detruitajn dum la milito konstruojn, kaj forirantaj rusaj armeoj detruis en Novogrudska uezdo 22,8% de ĉiuj konstruaĵoj, 38 fabrikojn, 154 bienojn kaj 1006 vilaĝojn.

Al tio necesas aldoni, ke la 17-an de januaro 1920, la pola registaro publikigis la leĝon, laŭ kiu ĉiuj forkurintaj antaŭe blankrusoj, kiuj ne revenis patrolanden ĝis 1. 4. 1921, perdas siajn rajtojn al terposedo. Necesas memorigi, ke al la granda parto de forkurintoj estis donita permeso reveni hejmen je la dato, notita en la leĝo.

## KOLONIIGADO DE OKCIDENTA BLANKRUSIO PER POLOJ

Forprenon de O. B. per polaj armeoj, kie poloj ekzistas en malgranda procentnombro — necesas ja iamaniere pruvi antaŭ la mondo. Aliflanke la forprenon de blankrusia teritorio per polaj armeoj — vilaĝa loĝantaro respondis per vico de ribeloj. Por plifortigi la polan regadon sur la teritorio de O. B., laŭ opinio de pola registaro, polaj militistoj kaj civila pola "osadnictvo" devis koloniigi la blankrusajn terspacojn. Unuflanke ĝi devis pligrandigi la elcenton de pola loĝantaro en la lando kaj aliflanke starigi "defendan volon", kiu dum la pacaj kondiĉoj devas helpi al poligado de la lando kaj teni ĝin en plena subigo (servuteco) al pola regno.

Rezulte de tiu ĉi plano pro grandegaj sumoj, donitaj de pola registaro, al Okc. Blankrusaj terspacoj estis direktata la ondo de polaj koloniistoj. Komence de 1923 estis transloĝigitaj 2268 familioj, fine de 1925 la nombro de polaj koloniistoj estis pli granda ol 13 000 familioj. Samtempe okazis la transloĝiĝo de polaj vilaĝanoj, kiuj aŭ tute ne havis teron aŭ havis ĝin malmulte. "Osadnictvo" (la unua speco) — plenumis laŭ komisio de pola registaro — milit-politikajn funkciojn, "Osadnictvo" (la dua speco) plenumis la polic-spionajn funkciojn. Ili observis la politikan spiritostaton de blankrusa loĝantaro.

Elspezante por tiu ĉi afero milionojn da "zlotoj" (pola mono), pola registaro ne donis la eblecon al blankrusaj forkurantoj antaŭaj, kiuj jam revenis hejmen — restarigi sian mastrumadon, kaj ili devis vivi en terkabanoj kaj labori kiel simplaj laboristoj por helpi al "osadnikoj" alveturigi el la arbaro, senpage al ili donitajn arbojn.

Same ili laboris por konstrui domojn por "osadnikoj".

# LERNEJ-KLERIGA MOVADO EN OKCIDENTA BLANKRUSIO

Okcident-Blankrusia lernejo havas ne tro longan, sed tre riĉan per faktoj historion. Kiel en tuta Blankrusio, same ĉi tie, ĝis la imperialista milito ne funkciis laŭleĝaj blankrusaj lernejoj. Funkciis nur kelkaj privataj lernejoj, kiuj estis organizitaj kaj funkciigitaj pro la iniciativo de kelkaj apartaj blankrusiaj laborantoj.

Dum la germaną okupado en la distrikto Vilno kaj Grodno estis organizataj pli ol 300 Blankrusaj unuagradaj lernejoj kaj porinstruista seminario en Svisloĉ kaj Baruny. Dum la milito la pola registaro pro taktikaj celoj kontraŭ Sovetio ne malhelpis al blankrusaj lernejoj, sed kiam la milito estis finita, ĉiuj lernejoj de Grodna distrikto (nombre 200) estis fermataj, same oni agis kontraŭ la lernejoj de Vilna gubernio kaj kontraŭ porinstruistaj seminarioj. En 1921, el ĉiuj blankrusaj lernejoj, kiuj funkciis antaŭe en O. B., restis nur 37.

Lukto, kiun havis blankrusaj laborulaj amasoj por defendi siajn lernejojn dum 1922—26, certigas pri la grandega pacienco de tiu ĉi amaso en la lukto por sia kulturo, kaj neaŭdita cinikeco kaj obstineco per kiu la burĝaro intencis mortigi la blankrusan kulturon.

En tiu ĉi nuligado de blankrusa kulturo necesas rimarki unu tre karakterizan momenton — tiel nomitajn "lingvaj leĝoj", kiuj estis deklarataj de la pola registaro la 31. junio 1924. Tiuj ĉi leĝoj estis cedo de la pola registaro, kiel rezulto de seninterrompaj blankrusaj ribelo kaj internacia situacio. Dum tiu ĉi tempo en Anglio formiĝis la registaro de Mac Donald, en Francio la maldekstra, unua registaro de Herriot. Por montri sian liberalismon, la pola burĝaro publikigis la leĝon, kiu deklaris la kondiĉojn por malfermo de blankrusaj regnaj lernejoj. La iniciato de malfermo apartenis al la loĝantaro mem, la gepatroj ne malpli ol 40, devis subskribi necesan petskribon kaj doni ĝin al la loka registara institucio. Se la lernejo estis malfermita, la studlingvo estis blankrusa. Polan lingvon oni instruis same kiel aliajn lernobjektojn. Sed, se en regiono, krom 40 blankrusoj, troviĝis 25 gepatroj, kiuj deziris eduki siajn gefilojn en pola lingvo — tiam la lernejo devas esti dulingva, tio signifas, ke parto da lecionoj estis instruata en pola lingvo plus deviga, kiel aparta lernobjekto, pola lingvo. Per

diversaj statistikaj artifikoj oni povis ĉiam fari tiel, ke la elcenta normo de blankrusoj fariĝis pli malgranda, ol postulis la leĝo, aŭ al 40 gepatroj forestis 1 aŭ 2 voĉoj, aŭ oni trovis infanojn, kiuj volis lerni polan lingvon.

Sed malgraŭ ĉiuj intrigoj la blankrusaj laborulaj amasoj estis tiel disciplinitaj, ke dum la lernjaro 1925—26 ili donis kelkmilojn da skribpetoj, laŭ kiuj post ĉiuj kontroloj de tre diversaj administraj organoj oni devis malfermi 412 lernejojn.

Ne necesas diri, ke nek unu el tiuj ĉi lernejoj estis malfermata.

Al la loĝantaro de O. B. restis nur jena fakto: batalo pro privata blankrusa lernejo kaj eksterlerneja edukado. Dum mallonga tempo dank' al la agado de la Asocio de Blankrusa Lernejo en Vilno estis organizataj pli ol 70 blankrusaj privataj lernejoj. Sed la pola registaro metis ilin sub sia observo. La 23-an de aprilo 1925 estis publikigata ordonò, laŭ kiu en tiuj ĉi lernejoj oni devige enkondukas polan lingvon, kaj fine de 1925—26 el 70 lernejoj oni fermis 67.

Komence de 1927 por 2½ milionoj da loĝantoj ne unu regna blankrusa lernejo funkciis; funkciis nur 4 privataj. En sama tempo por 56 000 rusaj loĝantoj en Polio estis 14 mezaj lernejoj.

Tio signifas, ke la pola registaro por premi blankrusajn laborulamasojn, kiel duarangan aperaĵon, toleris rusan elementon.

## REZULTOJ DE POLA MASTRUMADO EN OKCIDENTA BLANKRUSIO

Kiel rezulto de milito kaj transloĝiĝo, la tuta nacia havaĵo de O. B. malplimultiĝis je pli ol 60%. La pola registaro nenion faris por rekonstrui la detruitan mastrumadon. La industrio ankaŭ malprogresis.

En Vilna voevodstvo en jaro 1926 laboris en 1813 entreprenoj nur 7866 laboristoj, anstataŭ 12 130 konstante laborantaj. Do estis okupitaj nur 65%.

En tre grava industricentro de O. B., en urbo Bialistok en jaro 1926 laboris nur 3545 laboristoj en grandaj entreprenoj anstataŭ 5592 laboristoj en jaro 1914 — sekve nur 63,4% rilate al jaro 1913. En tuta O. B. en aŭgusto de 1925 oni nombris konforme al informoj de "Glownego Urzedu Statystycznego" (Ĉefa Statistika Oficejo) en la fabrikoj, kie oni laboras, 10 938 laboristojn kaj en

la fabrikoj, kiuj ne laboras, estas 4778 laboristoj, sekve ne laboris preskaŭ $^1/_3$ de la tuta laboristaro.

Saman detruon kaj malprogreson oni ankaŭ povis rimarki en vilaĝa mastrumado de O. B. La tergrundo okupita por semado per la 5 ĉefaj kampfruktoj: sekalo, tritiko, aveno, hordeo kaj terpomoj, malmultiĝis en 1926 en la tuta O. B. je 12,4% rilate al la ĝismilitaj jaroj (1900—1913). En Polesia voevodstvo malpli je 34,6% rilate al ĝismilita nivelo, en Novogradska je 19,6%. La ritmo de plivastigado de terspacoj por semado tre rapide malpliiĝis, kaj nun ĝi estas malpligranda ol eĉ en ĝismilita tempo.

| Jaroj | Terspaco por semado en milionoj da h-oj. | Ŝanĝoj rilate al antaŭa jaro + % |
|---|---|---|
| 1909—13 | 2,16 | — |
| 1922 | 1,55 | — |
| 1923 | 1,69 | 9,4 |
| 1924 | 1,80 | 6,3 |
| 1925 | 1,88 | 4,4 |
| 1926 | 1,89 | 0,7 |

Tiamaniere la vilaĝa mastrumado de O. B. stabiliĝis en la sama nedisvolvita nivelo. Pri ĉi tio ankaŭ certigas kelkmiloj da hektaroj, kiuj ne estas plugitaj[1]). En la strukturo de vilaĝa mastrumado mem okazas procezo de ekstensigado. Inter semad-kulturoj plivastiĝas nur sole la sekalkulturo, la signifo de l' terpomo restas neŝanĝita, relative kvanto da aveno, hordeo kaj tritiko malpliiĝas.

Ekstensigado de vilaĝa mastrumado, ĝia kvalita malboniĝo respeguliĝas en la granda ŝanĝiĝemo de rikolto.

Ekzemple, la rikolto de du ĉefaj termastrumspecoj de O. B. — sekalo kaj aveno estis en la:

| Jaro | sekalo | aveno |
|---|---|---|
| 1909—12 | 7,5 | 7,2 |
| 1922 | 8,3 | 7,6 |
| 1923 | 9,3 | 10,1 |
| 1924 | 6,6 | 6,4 |
| 1925 | 9,9 | 8,3 |
| 1926 | 7,8 | 7,6 |

La jaroj de malbona rikolto sekvas post la jaro de bona rikolto; al tio necesas noti, ke la amplekso de ŝanceliĝo atingas en kelkaj jaroj 50 elcentojn. Sed intertempe dum la ĝismilitaj jaroj O. B. estis la unua regiono en estinta Rusia Imperio laŭ sia firmeco, neŝanĝebleco kaj pligrandigo de rikolto.

La ĉefa kaŭzo de la mastrumada malprogreso en O. B. estas la deziro de la pola registaro reorganizi O. B. en agraran suple-

[1]) Estas tiel nomataj "oblogi", t. e. estintaj kampoj, kiuj jam delonge ne estas plugataj.

menton, en agraran kolonion de Polio. La registaro subtenas la industrion de centra Polio (t. n. "Kongresa Polio"), por malbonigi la industrion de O. B. La registaro subtenas la vilaĝan mastrumadon de Poznan kaj aliajn partojn de Polio, dezirante malhelpi al intensiva disvolvo de vilaĝa mastrumado en O. B. Per apartaj rimedoj de la registaro estis alkondukata ĝis plena malprogreso — la vilaĝmastrumada industrio de O. B., ekz. produktado de alkoholo eĉ ne atingis 6 elcentojn de ĝismilita produktado. Sistemoj de agrikulturaj entreprenoj konscie preteriras O. B.; sistemo de tarifo malhelpas intensigi la vilaĝan kaj arbaran mastrumadon kaj fariĝas oportuna nur ekstensiva grena kaj ekstensiva rabista arbara mastrumado.

La arbarojn de O. B. oni neniigas, pli ol la duono de l' tuta arbara eksporto de Polio venas el O. B. La arbtrunkaron oni forveturigas ne prilaboritan, malgranda tarifa pago por transveturigado de arboj malhelpas al disvolvo de arbara mastrumado en O. B.

Agraran politikon la registaro de Polio uzas por naciemaj celoj de koloniigado de O. B. per pola loĝantaro, por plena asimiligo de blankrusoj kaj plena poligado de blankrusaj terspacoj.

Okcidenta Blankrusio travivas la plej grandan termankon. La prezoj de la tergrundo rapide kreskas. La terspacoj estas dividitaj inter apartaj grupoj de mastroj, tre neproporcie, organizinte ne firman agraran ordon.

En 18 blankrusaj uezdoj de O. B., pri kiuj oni trovas precizajn informojn, la mastrumadoj laŭ revizia listo de 1921 dividiĝas jene:

| | Grupo de mastrumadoj | Nombro de mastrumadoj | Pluso de terspacoj en miloj da hektaroj |
|---|---|---|---|
| Malgrandegaj . . . . . | 0,5 h. | 11,6 | 3,2 |
| Parcelaj . . . . . . . | 0,5 h. | 31,6 | 43,0 |
| Malgrandaj . . . . . . | 2,5 h. | 112,5 | 395,0 |
| Mezaj . . . . . . . . | 5—10 h. | 103,0 | 732,0 |
| Bienulaj . . . . . . . | 10—20 h. | 44,9 | 606,9 |
| Kulakaj . . . . . . . | 20—50 h. | 14,2 | 409,1 |
| Nobelaj . . . . . . . . | 50—100 h. | 2,4 | 116,1 |
| Grandnobelaj (pan-bienoj) . | | 3,1 | 2 567,4 |
| Sume: | | 323,3 | 4 922,7 |

Tiamaniere 258,7 miloj da malgrandegaj, parcelaj, malgrandaj kaj mezaj mastrumadoj aŭ pli ol ¾ de la tuta nombro de ĉiuj mastrumadoj havas nur 1173,2 milojn malpli ol ¼ de la tutaj terenoj, kaj 31 miloj da grandnobelaj mastrumadoj, malpli ol unu centono de l' tuta nombro de mastrumadoj havas pli ol duonon da terspacoj. Malgranda kaj meza vilaĝanaro ne povas pligrandigi perfarmo la vastecon de sia havaĵo, ĉar pli ol ¾ de la tuta farma tero estas farmata de "kulakoj", nobelaj kaj grandnobelaj mastrumadoj.

La agrara reformo en O. B. efektiviĝas tro malrapide: dum 1921—25 estis distribuataj en 3 voevodstvoj de O. B. nur 125,8 miloj da hektaroj rilate 6830 milojn da hektaroj en tuta Polio. Plej multe da terspacoj ricevis ne blankrusoj, sed polaj koloniistoj, t. n. "civilaj osadnikoj". Krom tio sen ia agrara reformo, la pola registaro akceptis de O. B. grandajn terspacojn por dividi ilin inter polaj militaj osadnikoj.

Jam ĝis januaro 1922, al ili estis transdonitaj 69,7 miloj da hektaroj. La 1. 9. 1923 militaj osadnikoj havis nur en du blankrusaj voevodstoj en Polesia kaj Novogradska jam 105 milojn da hektaroj da grundo. Dum ĉiuj jaroj, kiam estas efektivigata agrara reformo, por polaj osadnikoj oni disdonis en O. B. ne malpli da terspacoj, ol por la parceligo (distribuo de la tero inter senkampaj kamparanoj).

La termalriĉa blankrusia vilaĝanaro de O. B. perdis tiele ĉiujn eblecojn pligrandigi sian terhavaĵon, al ili estis fermataj la vojoj por farmado kaj ricevado de tero laŭ agrara reformo. Sur la malgrandaj terspacoj la okc. blankrusa vilaĝano nur povus havi intensivan vilaĝmastrumadon de bestbredada tipo de mastrumado. Al tio malhelpas la ekonomia politiko de la pola registaro.

Ankaŭ necesas mencii, ke malgrandaj mastrumoj de vilaĝanoj en O. B. estas tre disĵetitaj, nenie en tuta Polio ekzistas ia dispartigo de kampoj je malgrandaj longaj terenoj kiel en O. B. Pli ol 70% da mastrumoj el Blankrusio havas teron en 6—10 lokoj — en Polio estas nur 28% de tiaj mastrumoj. Terondigado en O. B. fakte tute forestas; dum tuta tempo nur kelkaj dekoj da miloj estis racie ordigataj.

La vilaĝano de O. B., malgraŭ malgranda profito, kiun li havas de sia vilaĝmastrumo, pagas grandajn impostojn. Rezulte la profito de vilaĝano en O. B. estas tro malgranda, kaj li preskaŭ malsatas. Sian malfacilan mastruman situacion la vilaĝano ne nur povas vidi en la sistemo de ekonomia subpremo, kiun uzas la registaro nur en O. B. Same malgraŭ sia politika malkonscio kaj senalfabeteco la vilaĝano de O. B. revoluciiĝas, al tio alkondukis lin la pola registaro mem.

La revolucia movado en O. B., kiu naskiĝis el la rezulto de mastrumada regreso kaj malfirma ekonomia subpremo en O. B., akceptas naciajn formojn, ĉar kune kun la ekonomia subpremo en O. B. oni efektivigas la neaŭditan nacian subpremon, kiun oni ne vidis eĉ en malnova Rusio, Aŭstrio-Hungario kaj en Balkanaj landoj.

## BLANKRUSA KAMPARAN-LABORISTA UNIO "GROMADA"

Malfacila ekonomia subpremo de vastaj laborulaj amasoj, neaŭdita nacia subpremo, plena senrajtigo, teroro de okupacia registaro, — ĉio helpis al revoluciigo de blankrusaj amasoj, al kresko de ilia klaskonscio, al kresko de organiziteco de tiuj ĉi amasoj.

Samtempe okazis la disvolvo de naci-demokrata movado en O. B. Nacidemokrataj agantoj, kiuj reprezentis la dezirojn de blankrusia etburĝa intelektularo, per sanga praktiko de pola okupacia politiko konvinkiĝis, ke la esperoj je pola "demokratio" estis senfundamentaj kaj iluziaj, kaj Polio, memorante sian maldolĉan sperton de 150-jara subpremado, opiniis, ke ĝi sukcesos efektivigi la kunvivadon de ĉiuj nacioj laŭ principo: "liberaj kun liberaj, — egalrajtaj kun egalrajtaj".

La "restarigita" Polio, estis burĝa Polio kaj havis nenian alian politikon ol imperialistan, koloniigan, forraban kaj naciistan rilate al subpremitaj popoloj.

Samtempe tiuj ĉi agantoj praktike konvinkiĝis per la maldolĉa pano de eksterlanda blankrusia elmigrado, kiun valoron kaj kiun internan enhavon havas demokrataj fabeloj pri la rajto de nacioj al libervola apartigo, per kiu tre facile ludas la politikaj gvidantoj en imperialistaj ŝtatoj. Ili komprenis, ke tiuj liberamantaj demokrataj frazoj estas nur ŝirmilo por kaŝi personajn, rabajn apetitojn de imperialistoj. Por ili fariĝis klare, ke ricevo de sendependeco de O. B. kun la helpo de eŭropa demokratio "militema" — estas efektiva utopio, ĉar pli malgrandigi la teritorion de Polio ne koincidas kun la interesoj de franca kaj angla kapitalo; per tio ili malpligrandigas la bazon de ĝia milita forto.

Divido de Polio laŭ la etnografia principo signifus por la burĝaro de Eŭropo malfortigon de tiu milita fortikaĵo, kiu defendos ĝin, influite de eŭropaj laboristaj amasoj — de venkinta ekzemplo de socia revolucio en Oriento.

Tiuj blankrusaj agantoj ekvidis, ke irante tiun vojon ili idee bankrotas kaj alvenas al disrompita trogo[1]).

Dum la sama tempo, kiam ili komprenis sian idean bankroton,

[1]) Speciala rusa esprimo, prenita el fabelo de Puŝkin — signifas la neefektivigitajn revojn. — Rim. de tradukinto.

sian senreviĝon je eŭropa kaj pola demokratio — blankrusaj agantoj de naci-demokratia liberiga movado en O. B. bone vidis, ke malantaŭ la soveta landlimo efektiviĝas — sen ili, ne per iliaj manoj, kaj ne laŭ vojoj de ili montritaj — la renesanco de Blankrusio.

Blankrusia regneco, blankrusia kulturo, blankrusia ekonomio estis konstruitaj kaj konstruataj en BSSR per la manoj de milionaj laborulaj amasoj sub la gvidado de laborista klaso kaj ĝia komunista partio sur la ruinoj de ne nur bienul-burokrata cara imperio, sed ankaŭ sur la ruinoj de fruakuŝita — burĝ-demokrata respubliko.

Tiuj tri faktoroj rezulte alkondukis la plej sincerajn, honestajn, vere fordonintajn sin al la afero de popolaj amasoj — ideologojn de blankrusia naci-demokrata movado en la jaro 1925 al la akra ekviviĝo.

La komenco de tiu ĉi ekviviĝo efektiviĝis en la disfalo de nacia blankrusia sejma (parlamenta) klubo. El tiu ĉi klubo eksiĝis kvar deputitoj: B. Taraŝkeviĉ, S. Rak Miĥajlovskij, T. Mjatla kaj P. Voloŝin. Ili kontraŭstarigis al la restintaj deputitoj en blankrusia nacia sejma klubo: Jaremiĉ, katolika pastro Stankeviĉ k. a. — sian opinion en la afero de la blankrusia problemo en Polio kaj sian opinion pri la taskoj de reprezentantoj en pola sejmo de blankrusia laborulara kaj ekspluatata popolo.

La kvar eksiĝintaj deputitoj formis novan sejman klubon de blankrusia Kamparan-Laborista Unio "Gromada".

Tiu ĉi klubo proklamis, ke socia kaj nacia liberiĝo de blankrusiaj laborulaj amasoj ekzistas nur kiel afero de senpera batalado de tiuj ĉi vastaj laborulaj amasoj de O. B., intime kunligitaj kun la batalo de ekspluatataj kaj subpremataj amasoj de tuta Polio.

Sejma agado de deputitoj devas esti tre intime kunligita kun la ĉiutaga batalo de vastaj laborulaj amasoj de O. B. pro socia kaj nacia liberiĝo.

En 1926 la deputitoj de blankrusia sejma klubo[1]) de Blankrusia Kamparan-Laborista "Gromada" elpaŝis kun sia politika programo, kiu pli detaligis la supredirita jn opiniojn kaj adaptis ilin al la spirita stato de la vastaj laborulaj amasoj de O. B.

Ĉirkaŭ tiu ĉi Unio baldaŭ komencis unuiĝi la amasoj de kamparanoj kaj laboristoj de O. B.

La programo de Blankrusia Kamparan-Laborista Unio "Gromada" (ni estonte nomos ĝin mallonge "Gromada") havis la signojn de intelektula kaj etburĝa deveno, ĝi respeguligis la interesojn kaj dezirojn de radikala etburĝaro kaj unue la interesojn kaj dezirojn de meza kamparanaro de O. B.

---

[1]) Kluboj en pola parlamento estas la frakcioj de diversaj politikaj partoj. — Rim. de tradukinto.



[library stamp]

La politika programo de Gromada povas esti dividata je du partoj: programo de maksimumaj kaj minimumaj postuloj.

En la parto de maksimumaj postuloj de Gromada necesas noti jenajn postulojn: 1. rajton de popolo je sia sendependeco, kiu konkrete signifas por blankrusia nacia problemo laŭ la programo, kolekton kaj unuigon de blankrusaj terspacoj en sendependan respublikon sub la regado de kamparanoj kaj laboristoj. 2. Teron al kamparanoj sen elaĉeto. 3. Organizo de kamparan-laborista registaro.

Inter la postuloj de l' minimuma programo ni vidas la postulojn de ter-pliordigo en la formo de transloĝigo vilaĝanojn "el vilaĝoj — en apartigitajn terbienojn aŭ koloniojn, sed kondiĉe, ke al termalriĉuloj oni donu pli da terspaco, por ke ili mem povu havi sian propran mastrumadon". Rilate al impostoj Gromada postulis jenon: "Impostoj estu postulataj de regantaj riĉaj klasoj, kaj kamparanoj, kiuj tute ne havas terspacojn — termalriĉuloj aŭ mezaj kamparanoj — estu liberigotaj de tiu ĉi malfacilaĵo"...

Gromada postulas, ke estu nuligotaj ĉiuj "malrektaj" impostoj, precipe la impostoj por la tre necesaj objektoj.

Por plialtigi la ekonomian nivelon de kamparanaro, "Gromada" postulas plej vastan socian krediton por vilaĝa kaj laborista konsumo, produktiva kaj kredita kooperacio. Plue Gromada starigas vicon de komune-demokratiaj postuloj rilate al memregado, de politikaj liberoj, juĝo, armeo, polico kaj administracio. En ĝia programo estas enmetita postulo, ke ĉiuj organoj de regado estu elektataj de la popolo mem, sed ne destinataj laŭ ordonoj de administracio, kaj ke tiuj ĉi organoj estu sendependaj de la administracio kaj la regiono de ĝiaj agoj estu plivastigata. La programo de Gromada ankaŭ tre klare pretendas amnestion por ĉiuj politikaj "krimuloj". Ĝi postulas mallongigon de limtempo de militservado: "Sufiĉa malpliigo de la armeo, polico kaj administracio"; ĝi deklaras, ke ĝi celas anstataŭi la konstantan armeon per popola milico, ke ĝi batalas por tio, ke polico kaj oficistoj, ne esceptante eĉ ministrojn, estu respondecaj antaŭ la leĝo pro oficaj krimoj, kaj fine ĝi postulas la nuligon de politika polico kaj deklaras, ke ĝi "batalas kontraŭ la sistemo de turmentado kaj provoko".

Rilate al lernejo, lingvo kaj religio, la programo deklaras: "enkondukon de unusistema labora lernejo kun senpaga lernado flanke de la regno por la laborulaj elementoj (kamparanoj, laboristoj kaj laborula intelektularo); la lernado en ĉiuj regnaj lernejoj devas okazi en la gepatra lingvo de la lernantoj".

Gromada ankaŭ deklaras plenan liberecon de religio kaj postulas por la religio ĝian apartigon de la regno kaj politiko.

Kiel ni vidas, laŭ la deziroj de tiuj ĉi postuloj Gromada ne devis eliri el la limoj de radikalaj, burĝ-demokrataj partioj.

Ĝi laŭ siaj intencoj kaj metodoj de lukto, ne devis eliri ekster tiuj ĉi limoj, ĉar la aŭtoroj de tiu ĉi programo samtempe deklaris: "por efektivigi siajn celojn Gromada uzas la vojojn de laŭleĝa batalo konforme al la konstitucio kaj rajto".

Sed jam tiu ĉi fakto, ke Gromada forte kaj insiste luktis por efektivigi la devizon: "tero por vilaĝanoj sen elaĉeto" — en tiu tempo, kiam ĉiuj aliaj etburĝaj, reformistaj partioj perfidis la amasojn de kamparanaro, malriĉulojn kaj mezriĉulojn, rifuzante tiun ĉi devizon, kaj deklarante sian propran devizon pri la tero kun elaĉeto — certigas, ke Gromada estis la organizo, kiu vere reprezentis la interesojn de vastegaj malriĉaj kaj mezriĉaj kamparanoj.

La praktiko de la lastaj jaroj post imperialista milito, praktiko de batalado de laboristoj kaj kamparanoj en la tuta mondo por siaj rajtoj — ankaŭ influis la aŭtorojn de tiu programo. La programo enhavas ankaŭ en alia loko devizon, kiu montras la klasan karakteron de la organizo mem kaj montras la etapon de ĝia disvolvo. — Tiu ĉi devizo montras la kunligan agadon inter kamparanoj kaj laboristoj. Ni substrekas, ke l a b o r i s t o j kaj kamparanoj, sed ne kamparanoj kaj laboristoj.

Alia ne malpli grava devizo, kiu same tre klare montras la klasan karakteron de Gromada — estis la devizo de kamparan-laborista registaro. Ni konsideras necesa konigi al niaj legantoj la verajn intencojn de la aŭtoroj laŭ ĉi tiuj du punktoj, citante el la programo la koncernajn punktojn:

2. K u n l i g o d e k a m p a r a n o j k a j l a b o r i s t o j. 5. Liberigo de la tuta laborula popolo el sub la premo de kapitalo kaj de nacia subpremo — tio estas la komuna celo kaj komuna afero de kamparanoj kaj laboristoj. Efektivigo de tiu ĉi celo povas okazi nur en la plena kunligo de kamparanoj kaj laboristoj. 6. Laborula intelektularo en sia plej bona kaj sana parto trovas ĉi tie la bonan grundon por apliki siajn kreajn fortojn.

3. K a m p a r a n - l a b o r i s t a r e g i s t a r o. 7. Nur intima kunligo de kamparanoj kaj laboristoj povas starigi kamparan-laboristan registaron. Nur kamparan-laborista registaro povas doni al la subpremataj popoloj — liberon, al kamparanoj — teron, al laboristoj — laboron, kaj nur ĝi havas la forton rekonstrui la popolan mastrumadon kaj la tutan regnan kaj socian ordon laŭ pli saĝaj kaj justaj principoj kaj konduki la popolon ĝis plej bona estonteco. La devizo de kunligo inter la vilaĝanoj kaj laboristoj, la devizo de kamparan-laborista registaro — ne estis por Gromada nur agit-demagogia ludo — kompromisulaj etburĝaj partioj, kiuj laboris en la urbo, instigis la etburĝajn partojn kaj tiun parton de laboristoj, kiuj postsekvis ilin — kontraŭ vilaĝanoj entute, kiel kontraŭ spekulaciistoj, kiuj vivas per la profito de la urbo. De

alia flanko tiuj etburĝaj partioj, kiuj agis inter vilaĝanoj kaj reprezentis la interesojn de kulakoj kaj helpis fakte al burĝa influo je kamparanaro — instigis ĝin kontraŭ la laboristoj, kiel maldiligentuloj, kiuj ne volas labori pli ol 8 horojn kaj kulpas pro pligrandigo de prezoj je industriaj produktoj rilate la prezojn je vilaĝ-mastrumaj produktoj.

Gromada, same kiel analogia partio inter la pola kamparanaro — Sendependa Kamparana Partio (N. P. Ĥ.) ne iris tiun ĉi vojon, profitdonantan por la burĝaro, sed ĝi starigis sin por la defendo de solidareco inter la interesoj de la laborulara kaj ekspluatata kamparanaro kaj interesoj de laborista klaso kontraŭ la ekspluatantaj klasoj.

Gromada en sia programo skribas, ke ĝi:

"defendas ĉiujn sociajn atingojn de laboristoj, interalie ĝi batalas por 1. 8-hora labortago, semajna ripozo kaj pagataj ferioj; 2. malpermeso de laboro por infanoj kaj plibonigo de sanitaraj kondiĉoj de laboro en fabrikoj; 3. minimumo de laborpago; 4. regna asekuro — de laboruloj en urboj kaj vilaĝoj por malsanoj, kripligoj, senlaboreco kaj maljuneco; 5. strikrajto kaj plena libereco por profesi-sindikatoj; 6. leĝa konfirmo de fabrikaj komitatoj kaj rajto partopreni en la prizorgado de produktado."

Kompreneble Gromada ne estis klasa organizo de proletoj kaj kamparanoj, ĉar dum kapitalisma epoko **un**uigi en unu politika organizo tiujn du klasojn ne eblas, **kun**igi ilin — oni povas. Por komunistoj tiu demando povas kaj devas esti starigata tiel kiel ĝin starigis K-do Lenin dum sia polemiko kun "Narodniki" (popolanoj).

De unu flanko:

"necesas simple agnoski la profundan, neeviteblan dum la kapitalista sociordo, dum la regado de merkato, klasan disecon de vilaĝanoj kaj laboristoj en Rusio"...

Sed de alia flanko:

"necesas simple agnoski, kie n u n iliaj interesoj akordiĝas. Necesas unuigi ĉiun klason, grupigi iliajn fortojn, disvolvi ilian klaskonscion kaj klare difini tiun ĉi komunan taskon."

Gromada reprezentis la dezirojn kaj interesojn de malriĉula kaj mezriĉula kamparanaro de O. B., kaj estis ilia klasa organizo. Malgraŭ tio, ke en ĝiaj vicoj oni povus trovi ankaŭ la dungitajn laboristojn. Partio de proletaro ne ĉesas esti klasa organizo kaj same ne fariĝas la organizo de du klasoj nur pro tio, ke en ĝiaj vicoj troviĝas granda parto da kamparanoj — vilaĝaktivuloj.

Necesas tamen noti, ke la programo de Gromada enhavis kelke da punktoj, kiuj permesas apliki al Gromada signifon, donitan de

Lenin al vilaĝa leĝaro de 1917, kiun li starigis kiel politikan programon de kamparanaro.

Analizante tiun ĉi leĝaron Lenin skribis:

"la unua parto de la leĝaro estas dediĉita el ĝeneralaj politikaj tezoj, al postuloj de politika demokratio; la dua parto — al demandoj pri tero (ni esperas, ke Tutrusia Soveto de kamparanaj deputitoj, aŭ iu alia konfirmos ankaŭ la kamparanaran leĝaron kaj la rezoluciojn pri la demando de milito)."

Pri la unua parto ni ne parolos nun detale, sed nur notas du punktojn:

"en § 6 oni postulas la elekton por ĉiuj oficoj, en § 11 nuligon, post la milito, de konstantaj armeoj. Tiuj ĉi punktoj faras politikan programon de kamparanoj pli proksiman al la programo de bolŝevika partio[1])."

Tiel, laŭ sia programo el ĉiuj politikaj kamparanaj organizoj de Polio, Gromada, same kiel N. P. Ĥ. (Sendependa Partio Kamparana) staris plej proksime al programo de komunismo.

Do pro tio ĝin ni rigardas kiel veran radikalan klasan kamparanan organizon, kaj nenion plu. Estas tre karakterize kaj grave por precizigo de klasa karaktero de Gromada, ke tiu ĉi radikala, malriĉul-mezkamparana organizo en kelkaj fundamentaj kaj principaj pozicioj de komunista proleta movado malpaciĝis kun la partio de Proletaro. Tiel, en plej ĉefa demando pri hegemonio en revolucia movado, la ideologoj de Gromada ne agnoskis la gvidan rolon de Proletaro, ne agnoskis la hegemonion de Proletaro rilate al kamparanaro. Pro tio en sia programo la aŭtoroj insiste deklaris devizon de kunligo inkluzive kamparanoj kaj laboristoj, devizon de kamparan-laborista registaro. En la presaĵoj de Gromada ni tre ofte renkontis argumentojn al la temo pri egaleco de tiuj ĉi du kunuloj, pri tio, ke ili duope — Proletaro kaj Kamparanaro, devas gvidi la movadon je demokrataj principoj.

Samajn principajn malpaciĝojn ni ankaŭ vidas en la demando pri la rilatoj de Gromada al la devizo de sendependeco. Dum la sama tempo, kiam la partio de Polia proletaro — komunista partio de Polio kaj komunista partio de O. B. — deklaras rajton de nacio al sendependeco — ĝis la plena apartigo — en la programo de Gromada ni ne vidas tiun formulon. Kom. partio de O. B. en konkretaj blankrusaj kondiĉoj deĉifras devizon de sendependeco eĉ ĝis apartigo, ekstarigas antaŭ la amasoj — la taskon aliĝi al O. B., al frata BSSR. Tiu ĉi momento same forestas en la programo de revolucia-kamparana etburĝa organizo, — kia estis Gromada. Kontraŭe, tie kie oni parolas pri devizo de sendependeco — oni parolas pri "kolekto kaj unuigo" de blankrusaj terspacoj por fondi propran sendependan respublikon sub la regado de kamparanoj

[1]) Lenin, XIVa-volumo, parto II, paĝo 78, ruslingva eldono.

kaj laboristoj; en tiu sama paragrafo la aŭtoroj de programoj diras, ke Gromada energie subtenas la nuntempajn dezirojn de laboristaj amasoj, por krei la intiman socialistan union de eŭropaj popoloj. Konforme al tiu paragrafo Gromada disvolvas sian laboron en la sfero de internacia laborista solidareco. Tiamaniere la ideologoj de Gromada anstataŭis la devizon de Tutmonda Unio de Sovetaj Respublikoj — per malklara devizo de Socialistaj Ŝtatoj de Eŭropo.

Necesas fari rimarkon, ke pro objektiveco de siaj informoj pri la agado de Soveta registaro kaj la vivo de Sovetio kaj BSSR, kaj laŭ la tono de sia kritiko de Soveta Nacia Politiko kaj aliaj entreprenoj por disvolvo de vilaĝa mastrumado, G r o m a d a donis rajton pensi, ke ĝi konsideras Sovetion, kiel "fundamenton" de tiu "intima Socialista Unio de eŭropaj popoloj", pri kiu ĝi skribas en sia programo.

Tamen, plej klare la kamparana, etburĝa, ne-komunista karaktero de Gromada evidentiĝis en la du jenaj faktoj: foresto de perspektivo je socialista rekonstruo de vilaĝa mastrumado kaj nekompreno de neceseco detrui ĝis fundamento la aparaton de burĝa regno, kiel la organon de klasa diktaturo de burĝaro kaj bienuloj.

Estas kompreneble la aroganta mensogo, la intenco de faŝista diktaturo, egaligi Gromada-n al ekspozituro de Kompartio, sed nur tio estas vera, ke Gromada, malgraŭ siaj suprenotitaj ideologiaj mankoj, laŭ sia programo, kiel ĝi estas skribita en laŭleĝa programo de Gromada, sendispute staris plej proksime el ĉiuj aliaj kamparan-organizoj de Polio (ekskluzive N. P. Ĥ.) — al programo de proleta partio.

Gromada disvolviĝis treege rapide. Dum la jaro de ĝia ekzistado la kvanto de ĝiaj lokaj organizoj estis pli ol mil, kvanto de membroj pli ol centmil. Tio okazis en la lando, kiu nombras ne pli ol tri milionojn da loĝantoj, en la lando, kiun ĝis nuna tempo oni konsideras, kiel malplej kulturan kaj politike plej regresan.

Maltrankviligitaj, pro rapida kresko de Gromada, bienuloj kaj la okupada administracio ekalarmis. En la burĝaj gazetoj komencis aperadi artikoloj, kiuj en la oblikva spegulo de bienula malamo — respegulis tiun grandan donitan aŭtoritaton kaj konfidon — kiun havis Gromada inter blankrusaj kamparanoj kaj tiun grandegan deziron por unuigo de fortoj al la batalo, por kiu preparis sin blankrusia vilaĝo. En tiuj ĉi korespondaĵoj de bienuloj ni legas:

> "En Molodeĉna uezdo Gromada atingis grandegan sukceson. En nia vilaĝo trankvile regas la potenco de Gromada, ĝiaj vojtoj (vilaĝestroj), ĝia milico... Pri la fortoj de Gromada parolas tiu fakto, ke en malbone organizita Postavska uezdo ĝi nombras 2000 membrojn kaj 65 rondetojn. Ili funkcias laŭleĝe. Unu rondeto laboras en unu aŭ du vilaĝoj. La kunvenojn vizitas 80 ĝis 100 personoj. Tiuj rondetoj kunvenas ĉiumonate."

Kompreneble, la organo de bienuloj tre ektimigita pro la kresko de Gromada, volis krei la impreson, ke la laboro de Gromada estis konspira, sed ĝi elbabilis, ke dum ĉiuj kunvenoj ĉeestis la agentoj de la polico, kiuj ne povis trovi en la laboro de tiuj ĉi rondetoj iun kontraŭkonstitucian fakton, ĉar aliokaze ili tre rapide dispelus tiujn kunvenojn.

La bienuloj mem klarigis la kaŭzojn de tiu nevideble rapida disvolvo de Gromada. Ili skribis, ke la agoj de Gromada havis sukceson unue pro tio, "ke la devizoj, kiujn propagandis ĝiaj agitantoj, renkontis bonan grundon, kreitan pro katastrofa situacio de tiuj ĉi terspacoj, pro nekontentigo rezultinta el daŭra ekonomia krizo, pro kruela impostleĝo ... malbona rikolto dum la lastaj kelkaj jaroj, senlaboreco — jen estas la fortaj helpantoj de Gromada".

Organo de polaj "demokratoj" Pilsudski-anoj "Kurjer Wilenski" (la 2. 1. 1927) aldonas al tiuj ĉi faktoj ankoraŭ aliajn: "Esceptante la kontraŭŝtatajn dezirojn inter la loĝantaro de nia lando, faktoro — kiu estas la administrantaro mem. Inter la administrantaro", — skribas la organo de demokrataj faŝistoj — "regas malamika rilato al la loka ne pola loĝantaro. Ĉiupaŝe, pro eĉ senkulpaj agoj de blankrusoj al litovoj nia administracio aplikas, ĉu grandajn aŭ malpligrandajn persekutojn.

Tiun ĉi malamikan rilaton de la administracio, precipe en lernejaj demandoj ... la loĝantaro bonege sentas kaj respondas al ĝi konforme."

La kresko de Gromada, kiu estis tro rapida en la jaro 1926, plifortigo de vastamasa organizado kaj pro tio kresko de amasa memkonscio, pligrandigo de okazoj, kiam la kamparanoj organize kontraŭpaŝis la bienulojn — okupantojn — ĉio montris al la subpremantoj, ke Gromada plifortigas kaj pliformigas tiun ĉi ondon de popola indigno, kiu forbalaos el la subpremata lando la ekspluatantojn kaj subpremantojn. Pro tio la bienuloj kaj la okupaciaj regantoj vidante en la laboro de Gromada preparon "de fundo por socia revolucio" — per sia gazetaro, same kiel per aliaj organoj de la pola gazetaro, tamen per divido je "demokratiaj" aŭ naciistaj — komencis frenezan atakon kontraŭ Gromada. Tamen, pli kruelajn rimedojn kontraŭ la centmilana organizo — la pola registaro ne kuraĝis apliki.

Nur post unu jaro, post la maja faŝista ribelo, kiam Pilsudski sukcesis unuigi la burĝajn klasojn ĉirkaŭ sia diktaturo sur la bazo de akra atako kontraŭ la atingoj de la laborista klaso kaj kamparanaro, la burĝaro kaj la bienuloj trovis fortojn por lukti kontraŭ la radikala kamparana movado en Polio kaj O. B.

Pilsudski, konforme al siaj militaj planoj kontraŭ Sovet-Unio, por sekurigi postfronton, — nuligis la Sendependan Kamparanan Partion en Polio kaj la "Blankrusian Kamparan-Laboristan Union

"Gromada". La atakon kontraŭ la radikal-kamparana movado ekkomencis kaj daŭrigis ministro de faŝista registaro de *Pilsudski* — la granda bienulo de O. B., estinta membro de Rusa Regna Parlamento (Duma), konata pro sia servado antaŭ la rusa carismo — Meiŝtoviĉ.

La atako, kiun komencis la registaro de Pilsudski-Meiŝtoviĉ, estis duflanka; unue per kompromisa kaj konservativa gazetaro oni preparis la socian penson de Polio tiudirekte, ke Gromada en iliaj okuloj estu spiona kaj terorista organizo. Ĉiutage en la gazetoj aperis artikoloj, kiuj sub sensaciaj titoloj kreis pseŭdajn krimojn de Gromada, kvankam laŭ la enhavo de tiuj ĉi artikoloj ili havis nenian rilaton al Gromada. "Prezidanto de iu rondeto — krimulo". Subtitolo: — "Sensaciaj rezultoj de juĝa esploro en la demando de atako al vagonaro". "Aresto de spion-bando". Subtitolo: "Oni suspektas la kontakton kun rondetoj" ktp. ktp. Samtempe la faŝista registaro organizis per la helpo de la polico faŝistajn batalgrupojn, kiuj organizis armitajn teroristajn atakojn kontraŭ apartaj aktivaj membroj de Gromada en la ejo de Gromada kaj dum ĝia kongreso. Pligrandiĝis la premoj rilate al Gromada kaj ĝiaj membroj flanke de laŭleĝaj reprezentantoj de la registaro. Oni arestis centojn da personoj pro tre malseriozaj kaŭzoj kaj post kelkaj tagoj aŭ semajnoj de ilia malliberigo en malpuregaj polic-turmentejoj, doninte necesan kvanton da batoj en la dentojn, — oni liberigis ilin.

Alia metodo, kiun oni vaste aplikis en la batalo kontraŭ Gromada, estis tiu metodo de provokoj. Vico de provokistoj, jam konataj kaj delonge senmaskitaj, el kiuj la plej konata en Polio kaj Blankrusio estas Gurin, komencis raporti fantaziajn kaj elpensitajn informojn pri neekzistanta interligo inter la rondetoj kaj partizanaj taĉmentoj, agantaj en O. B. Ili raportis pri interligo de Gromada kun Soveta Registaro, pri spiona laboro, kiun gvidas la deputitoj de Gromada.

Oni komencis akuzadon de l' deputitoj. En centoj da artikoloj kaj korespondaĵoj oni skribis pri ili, pri la "jam aĉetitaj" personoj, kiuj ricevas monsubtenon de alia ŝtato (legu soveta)!

Tiun ĉi kampanion de mensogo kontraŭ Gromada kaj ĝiaj gvidantoj efektivigas la burĝaj gazetoj de ĉiuj partioj kaj direktoj. Malgraŭ tio, ke komence de la agado de Gromada tiuj ĉi organoj estis devigataj agnoski la grandan honestecon, nekoruptecon, grandan idealismon de la Gromada-gvidantoj. Bienula "Slowo" la 17. oktobro 1926 skribis, ke "inter la agantoj de Blankrusia Gromada oni renkontas idealistojn kiel ekzemple deputiton Taraŝkeviĉ kaj aliajn homojn seriozajn, kulturajn ktp." La 18. januaro 1927 la sama gazeto en la artikolo "Tragedio de deputito Taraŝkeviĉ" skribis: "Deputito Taraŝkeviĉ estas idea, morale pura persono".

Komence de januaro 1927 la faŝista registaro decidis transiri al preparo de senpera atako kontraŭ la radikala kamparana movado kaj fizike nuligi Gromada-n. La gvida estraro de Gromada, havanta la "deputitojn de pola sejmo, kun rajto de netuŝebleco" — estis arestata kaj ĵetata en turmentejon. La organizon oni deklaris malpermesita. La polico sub la gvidado de defenzivo[1]) arestis la gvidantaron de la lokaj rondetoj, forprenis ĉiujn dokumentojn kaj postulis, ke ĉiu membro de Gromada mem fordonu siajn membrokartojn kaj subskribu la deklaron pri la eksiĝo el Gromada.

La areston de deputitoj kaj nuligon de Gromada, kruelan teroron rilate al ĉiuj, kunligitaj kun tiu ĉi organizo, la laborulaj amasoj de O. B. renkontis kun grandega indigno.

En urboj kaj vilaĝoj de O. B. okazis grandegaj manifestacioj de protesto, estis organizita kampanio de peticioj, por liberigi la deputitojn kaj aliajn politik-arestitojn. Oni kolektis centmilojn da subskriboj. Kontraŭ tiu ĉi indigna ondo la faŝista registaro ne havis forton batali kaj ne sukcesis sufoki ĝin, kvankam ĝi aplikis la metodojn de freneza kaj kruela faŝismo.

Celante nuligon de la radikala kamparana naciliberiga movado en O. B., kies plej efika amasa reprezentanto estis Gromada, la faŝista registaro de Pilsudski bonege komprenis, ke nur per teroro ĝi ne sukcesos atingi sian celon. Estis necese, samtempe interne paralizi tiun ĉi movadon. Estis necese, anstataŭigi Gromada-n per iu alia organizo, kiu devas provi instigi la simpatiojn de Gromada-adeptoj, disorienti tiujn ĉi amasojn kaj tiele fari ilin — senvola ilo de la faŝista diktaturo.

Esperante atingi ĉi tiun celon la registaro de Pilsudski, ne malfortigante la teroron rilate al la radikala kamparana movado kaj vastaj laborulaj amasoj de O. B., — por la interesoj de blankrusa kulako, faris tutan vicon da ekonomi-politikaj kaj naciaj cedoj por ilia utilo. La registaro de Pilsudski celis per tiuj ĉi agoj disvastigi sian socian fundamenton en O. B.; ĝi estis certa, ke nun, kiam la masoj de malriĉuloj kaj mezriĉuloj, unuigitaj en Gromada, komencis akran batalon kontraŭ siaj ekspluatantoj, la blankrusa kulako fariĝos pli persistema kaj facile blokiĝos kun la faŝista registaro de okupantoj.

Tio plene efektiviĝis. La blankrusa kulako kaj la politik-ekonomiaj kaj sociaj organizoj, reprezentantaj siajn dezirojn kaj interesojn, responde al la manovro de la registaro — obeeme plenumis ĝiajn ordonojn, pli-malpli malkaŝe. Dum la pasinta jaro blankrusaj kompromisaj partioj plifortigis sian agadon, kiel en eldona fako, same kiel en la fako de parola agitado. Oni povas rimarki, ke sur la grundon de blankrusia kompromisa movado

[1]) Politika polico de Polio, kies celo estas per ĉiuj rimedoj batali kontraŭ la revolucia movado.

pluvis ora pluvo el faŝista nubo. Ricevinte de la "defenzivo" monon por la laboro, ĉiuj efektivaj agentoj de la defenzivo, kiel ekzemple Pavljukeviĉ, Gurin, aŭ maskitaj kunuloj de faŝismo Umjastowski, Jaremiĉ, Rogulja, katolika pastro Stankeviĉ — komencis fervore konkuraĉi unu la alian en la atako kontraŭ Gromada.

Tamen la elpaŝojn de ĉiuj suprenomitaj kompromisuloj kontraŭ la nuligita de faŝistoj "Gromada" la laborulaj amasoj renkontis ne nur kun abomeno, sed kun granda indigno, je kiu la kompromisuloj ne ĉiam sukcesis kaŝi sin post la dorso de la polico.

Kampanio de la kompromisuloj, — provoj profiti politikan kapitalon je nuligo de Gromada, pro terurega mensogo kaj atako kontraŭ Gromada-anoj kaj ideologoj kaj gvidantoj de Gromada — deputitoj de sejmo — fiaskis.

Vastaj laborulaj amasoj, kiuj tre sindoneme kaj kuraĝe defendis Gromada-n kaj la arestitajn deputitojn, kun malestimo deturnis sin de tiuj abomenaj lakeoj de pola politika polico — blankrusaj kompromisuloj. Pro tio okazis la disfalo en la kamparana unio de Jaremiĉ. La grupo de Janka Stankeviĉ, ekvidinte la netaŭgecon de la taktiko, kiun aplikis Jaremiĉ por detrui Gromada-n, por plifortigi siajn kompromisajn poziciojn, decidis komenci alian pli ruzan taktikon. Li eksigis, pli kompromitiĝintajn, en la batalo kontraŭ Gromada-personojn — gvidantojn de kamparana unio — Jaremiĉ kaj Pagulja kvazaŭ pro tio, ke ili ne defendis Gromada-n, sed eĉ partoprenis batalon kontraŭ ĝi. Ili nomis sin rekonstruintoj de "malnova" kamparana Unio.

Tiu ĉi grupo por trompi la amasojn — komencis "defendi" Gromada-n. Pri tiu ĉi defendo oni povas diri jenan proverbon: "defendu min kontraŭ amikoj, kaj mi kun la malamikoj mem batalos." La grupo de Janka Stankeviĉ tre singardeme, nur kvazaŭ "interalie", kritikis la "ekstremojn" de Gromada kaj laŭ sia deziro aliformigis la devizojn de Gromada, tiele, ke ili havu kontraŭrevolucian enhavon, profitan por kunligo de blankrusa kulako kun la pola faŝista bloko. Al la devizo pri la kunligo de kamparanoj kaj laboristoj ili "aldonis" vortojn: blankrusiajn kamparanojn kaj laboristojn. Tiamaniere oni ricevis devizon, kiu alkondukas laborulajn kaj ekspluatatajn amasojn de blankrusia vilaĝo al burĝa devizo de unueca nacia fronto. Devizo, direktita kontraŭ la unueca fronto de la blankrusaj laboruloj kun subpremataj kaj ekspluatataj amasoj de tuta Polio. Sed ankaŭ tiu ĉi ruza taktiko uzi la nuligon de Gromada por kontraŭrevoluciaj celoj, por la celoj de perfido, havis nenian sukceson . . . La grupo de Stankeviĉ restis kiel grupo, deŝirita de vastaj laborulaj amasoj, intelektuloj, havantaj bazon en la sama malforta socigrupo de blankrusia kulakaro, kiu servas kiel abomena medio por aliaj perfiduloj kaj kompromisuloj.

Post jara ruiniga laboro de defenzivo, provokistoj kaj juĝ-

oficistaĉoj de la faŝista burĝ-bienula registaro decidis fari la lastan, kiel al ĝi ŝajnis ekbaton kontraŭ Gromada.

Ĝi decidis surscenigi komedion de juĝproceso kontraŭ Gromada, kontraŭ la organizantoj kaj aktivaj agantoj de centmilana laŭleĝa organizo de okcidént-blankrusiaj laboruloj.

Antaŭ la faŝista juĝo staros 490 personoj. Laŭ la kvanto de subjuĝantoj la faŝista registaro starigis per tio tutmondan rekordon. Tiu ĉi estas la unua en la historio, laŭ la amaso de juĝatoj.

Por malpli fortigi la impreson de tiu ĉi juĝproceso, la faŝista registaro decidis fari el ĝi — 4 apartajn juĝprocesojn. Per turmentaj verdiktoj, bazitaj je la juĝrespondoj de provokistoj, la faŝista registaro de Polio provos pravigi sian sangan subpremon al la laborularo en O. B. Sed tiun ĉi juĝon la laborista klaso kaj revolucia kamparanaro de la tuta mondo direktos kontraŭ la faŝista reĝimo, kontraŭ la pola okupado, kiu terurege premas la blankrusan popolon.

Nek teroro de faŝista registaro, nek fronta atako de ĝiaj blankrusaj perfiduloj kaj kompromisuloj, nek ruza taktiko de fidele servanta al pola faŝismo — grupo de Janka Stankeviĉ, nek tiu juĝa ekzekuto, kiun oni preparis por Gromada-anoj — sukcesis nuligi kaj nuligos la revoluci-kamparanan movadon en O. B. Ili ne sukcesos doni al ĝi alian direkton!

Nur ŝanceliĝas apartaj intelektulaj kunirantoj de radikala kamparana movado, timas, perfidas kaj helpas al faŝismo tiaj personoj, kiel ekzemple la estinta membro de Gromada-klubo en sejmo Sobolevskij — sed la laborulaj amasoj forte staras sub la standardo de Gromada. Tion povis vidi la malamikoj de laboruloj laŭ la rezultoj de elektkampanio, kiu okazis sub la premo de faŝistaj okupantoj en la urbaj kaj vilaĝaj oficejoj de memregado.

La Blankrusia Kamparan-Laborista Unio "Gromada" vivis kaj vivos. Ĝi vivis kaj vivos estonte per tiu grandega praktiko de politika batalado, per tiu socia aktiveco, kies aperon ĝi helpis, per tiu profunda konscio de siaj veraj interesoj kaj vojoj al defendo de laboruloj, per tiu klara kompreno de vojoj ĝis finfina venko super la ekspluatistoj, kiun ĝi helpis disvastigi inter la vastaj amasoj de laboruloj en Okcidenta Blankrusio.

## KLARIGOJ

pri kelkaj vortoj, uzitaj en tiu ĉi broŝuro kaj eble ne tuj komprenataj de la legantaro.

OSADNICTVO = Disdonado de tero al estintaj soldatoj de pola armeo tiel nomitaj "osadniki".

OSADNIKO = Tiel oni nomas en O. B. estintajn soldatojn de pola armeo kaj ĝenerale polajn kamparanojn, al kiu la registaro disdonas la liberan (aŭ eĉ ofte ne liberan teron). En O. B. "osadniki" estas treege malamataj de blankrusa kamparanaro.

VOEVODSTVO = Distrikto. Polio havas "voevodstvojn".

KULAKO = estas la tipo de riĉa kamparano, kiu riĉiĝis per ekspluatado de siaj samvilaĝanoj; la tipo de kulako estas disvastigita en tuta Sovetio kaj konsistigas proksimume 3—6 % de ĝia kamparanaro.

PANO = Grandsinjoro — tiel en Polio estas nomataj la grandnobeloj. Lastatempe oni uzas tiun ĉi vorton eĉ anstataŭ simpla sinjoro.

SEJMO = Pola parlamento.

NARODNIKI = Intelektuloj de 1870—90 jaroj en Rusio, kiuj opiniis nenecesa kapitalistan periodon en Rusio. La nunaj rusaj marksistoj akre batalis kontraŭ ili.

PARTIZANOJ = Neregulaj militistoj el blankrusia kamparanaro; tiu movado de partizaneco estis forte disvolvita dum la jaroj 1920—27. Nun partizanoj ne ekzistas en O. B.

UEZDO = Distrikto en Rusio.

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)

B0000003137923

Бел. ддзел
1994 г.